

ESPERANTO

TRIUMFONTO

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio).
W.M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Noria, Barcelona
Teo Jung, Köln (Kolonjo).
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Buitin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando, Germanio.
Poŝtĉeka konto Köln 70865, por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu nur sur unu flanko de l' papero. Skribu ĉion legeble, se eble per maŝino. Por resendado aŭ respondo aldonu resp.-kup. aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al s-o Teo Jung, Köln-Horrem, Germanio.

ABONEJOJ
ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la anonca pago. — En multaj lokoj ET estas poekzemplere aĉetebla ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazetoj kaj libro-vendejoj kaj en grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazeto-vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komercaj ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe la administrado per oficiala letero. — Bibliotekoj, legejoj, redakcioj, aŭtoritatuloj (ne-Esperantistaj) povas ricevi ET pro propagandaj celoj por la duono de la abonprezo.

Aperas semajne.
5 dolaroj, 7.50 guldenoj, 12 svedaj kronoj, 15 svisaj frankoj, 15 ŝilingoj, 15 danaj aŭ norvegaj kronoj, 15 pesetoj, 25 francaj aŭ belgaj frankoj, 35 liroj, 60 finnaj markoj, 75 ĉsl. kronoj, 360 hung. kronoj, 1800 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaj bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaj bankoj laŭ la taga kurzo. — Balkanaj kaj baltaj ŝtatoj pagu duonjare 50 gmk., Rusio 40 gmk.. Aliaj landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, aŭ 100 respondu-kuponoj aŭ 400 germanaj markoj. — Ne estas necese pagi tutan jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero. — Germanoj abonu ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 8, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“), kvaronjare 25 50 mk., aŭ rekte ĉe la administrado Köln Horrem Germanio (ĉiu numero banderolita 2.50 mk.).

ANONCOJ
kostas po cm² (kvadracento metro) por ĉiuj landoj 5 gmk., ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj granda rabato. — ANONCOJ kostas po 2 foja enprezo kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj (ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/18 jarabono aŭ 4 stampitaj respondu-kuponoj); por malbonvalutaj landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/6 jarabono); 1 foja enprezo kostas la samon kiel 2 foja; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncoj de la abonkonto. — Familiaj anoncoj (naskiĝo, fianĉiĝo ktp.) kaj anoncoj pri gravaj esp. okazintaĵoj (ĉefkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enprezataj senpage.

Numero 76 :-: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 19. Marto 1922.

Oficiala instruado en 34 bulgaraj gimnazioj.

Laŭ la statistiko de Bulgara Esperanto Societo pri la lastaj kvaronjaroj 1921 Esperanto estis oficiale instruata en 34 gimnazioj de 34 oficialigitaj lektoroj (en apliko de la Leĝo por Popola Instruado). 17 gimnazioj sendis informon pri la partoprenantoj ĉe la Esp kursoj; ili atingas la ciferon 734. Supozante, ke en la ceteraj 17 gimnazioj la nombro de la partoprenantoj estas nur duona, oni atingas ciferon de pli ol mil.


Jen grava fakto, kiu — en Genève sufiĉe akcentite — povos tie multe helpi nian aferon.

Ankoraŭ iom pri propagando.

Lastatempe, kiel jam antaŭe, reaperis — ĉi tiufoje en ET — artikoloj pri la propagando de nia lingvo. Estas tute komprenebla ĉi tio, ni ja ĉiam ankoraŭ restas en la unua epoko, la epoko de propagando. Prave skribis antaŭ kelka tempo D-ro Privat, ke la bonegaj ŝancoj, kiuj aperas por nia lingvo en la nuna tempo, ne devas iluziigi nin, ke ni estas jam kvazaŭ venkintaj „sur la tuta linio“. Ni fakte posedas ankoraŭ tre multajn kontraŭulojn. Inter la plej danĝeraj mi citus ne la rektajn, sincerajn malamikojn de nia ideo (ili ja estas nur malmultaj: kiu civilizita homo kontraŭstaras nian belegan „utopion“?), sed la kaŝitajn: tiujn, kiuj per sia morta silentado kaj indiferenteco fakte senpovigas la plej diligentajn batalantojn de nia afero.

Ĉu vi trafos ilin, tiujn „profesorojn“, „docentojn“, „verkistojn“ kaj aliajn „titolulojn“, kies aŭtoritateco en ekster-Esperantaj aferoj igas ilin arogi al si la rajton eldiri juĝojn tute ne decantaj nek konvenantaj al ilia scienca kaj socia pozicio? Jen la problemoj! Trafu ĉi tiujn kaj vi trafos la amasojn!

Oni ofte skribis pri „la sepa potenco de l' mondo“, pri la gazetaro. Kaj kun fervoro, certe



El la lando de nia Dekkvara: Kampdomoj apud la Hviträsk, okcidente de Helsinki, konstruitaj laŭ projektoj de Elias Saarinen kaj Axel Lindgreen.

forĝes! nenion el tio, kio povis nin endanĝerigi, li ŝajnis sin riĉa, promesis al ili por la elspezoj kaj por gvidado la morgaŭan tagon, ĉion, kion ili volis. Fine, li parolis pri sia valizo, tre petante, ke oni havu grandan zorgon por ĝi, ke oni havu grandan zorgon por ĝi, ke oni metu ĝin ĉe la kapo de lia litoj; li ne volis, li diris, alian kapkusenon. Ha! junulo! junulo! kiom via aĝo estas. Kompatinda! oni kredis, ke ni havis ĉe ni la diamantojn de la krono.

Post la fino de la vespermanĝo, oni lasis nin solaj; niaj gastigantoj kuŝis malsupre; ni en la supera ĉambro, en kiu ni estis manĝintaj; subtegmenta ĉambro, sep ĝis ok futojn pli alta, kiun oni atingis per ŝtuparo, estis la kuŝejo, kiu atendis nin, speco de nesto, en kiun oni enŝovis sin rampante sub trabetoj ŝarĝitaj per provizoj por la tuta jaro. Mia kamarado tien grimpis sola kaj kuŝiĝis jam dormante, kun sia kapo sur sia trezora valizo. Decidinte ne dormi, mi faris bonan fajron, kaj sidigis apud ĝi.

La nokto estis preskaŭ pasinta sen aventuro, kaj jam mi komencis trankviliĝi, kiam en la horo, je kiu la sunapero ŝajnis al mi ne malproksima, mi aŭdis sub mi nian gastiganton kaj lian edzinon parolantaj kaj disputantaj, kaj aŭskultante per la kameno, kiu komunikigis kun la malsupra, mi perfekte distingis tiujn vortojn de la edzo: „Nu, ĉu ni mortigu ilin ambaŭ?“

Kion diri? Mi restis apenaŭ spiranta, mia tuta korpo malvarma kiel marmoro; vidante min vi ne estus sciinta, ĉu mi estas morianta aŭ viva, Dio! kiam mi repensas pri tio! . . . Ni ambaŭ preskaŭ sen armiloj kontraŭ ili deku aŭ dekvin, kiuj havis tiom multe! Kaj mia kolego, kvazaŭ morianta pro dormo kaj laceco! Lin vokli, fari bruon, mi ne kuraĝis; sole min forsavi, mi ne

Kaj ni ne forgesu, ke postuli, ke la jurnaloj konstante skribadu pri nia Esperanto, dum ekzistas centoj da aliaj fakte almenaŭ same gravaj problemoj kaj interesoj, estas postuli, ke tiu el ni konstante ekz. manĝadu daktilojn, ĉar ili estas bonaj kaj tre nutraj, kvankam nia korpo de miloj da jaroj kutimiĝis al la malpli bona pano

Sed mi revenas al la ĉefaĵo: Kiel venki la plej danĝeran malamikon, la indiferentcon de tiuj, kiuj devus unuavice esti interesataj pri la problemoj de lingvo internacia, t. e. la kleruloj, por kiuj progresigado de novaj tuthomaraĵoj ideoj kaj instrumentoj estas la plej sankta devo?

Ĉu precize ili estas inter tiuj, kiuj plej malmulte havas da influo sur la kurso de l' historio? Ĉu nur por tio ili estas, ke ili konstatu, konservu kaj tradiciigu la faktojn? Aŭ eble ili opinias, ke Esperanto estas pure teknika, komerca kaj industria instrumento, por kiu ne valoras perdi la tempon; finfine ĝi ne alportas al ili kaj al de ili al-

povis: la fenestro ne estis alta, sed malsupre du fortaj hundoj bojegadis kiel lupoj. En kiu situacio mi troviĝis, imagu, se vi povas. Post kvarono da horo, kiu estis longa, mi aŭdis, ke iu suprenvenas, kaj tra la fendoj de la pordo, mi vidis la patron, kun lampo en unu mano, en la alia unu el liaj tranĉilegoj. Lia edzino venis post li; mi estis malantaŭ la pordo; li malfermis; sed antaŭ ol eniri, li donis la lampon al sia edzino; li eniris nudpiede kaj ŝi de ekstere diris al li mallaŭte, kaŝante per siaj fingroj la troan lumon de la lampo: „Senbrue, iru senbrue!“ Kiam li atingis la ŝtuparon, li grimpis, kun sia tranĉilo inter la dentoj, kaj atinginte la liton, kie tiu malferma kuŝanta junulo prezentis sian malkovratan gorĝon, per unu mano li prenis sian tranĉilon kaj per la alia . . . Ha! . . . li kaptis ŝinkon, kiu pendis de la plafono, detranĉis pecon kaj foriris, kiel li estis veninta. La pordo estis refermata, la lampo malaperis, kaj mi restis sola kun miaj priprenoj.

Tuj kiam aperis la taglumo, la tuta familio kun granda bruo venis nin vekti, kiel ni estis petintaj. Oni alportis manĝaĵojn; oni prezentis tre puran matenmanĝon, tre bonan, mi certigas al vi. Du kaponojn ĝi enhavis, el kiuj, diris mia gastiganto, ni devas manĝi unu kaj preni kun ni la duan. Vidante ilin mi fine komprenis la sencan de tiuj teruraj vortoj: „Ĉu ni mortigu ilin ambaŭ?“ Kaj mi opinias vin sufiĉe sagaca por diveni nun ilian signifon.

Paul Louis Courier.
Tradukis Richard Levin.

Notoj: Kalabro = provinco de Suda Italio.
P. L. Courier = (1772-1825) franca publicisto, fama per siaj pamfletoj kaj spiritalaj leteroj. Tiu letero, skribita al iu kuzino lia, prilaktas aferon okazintan dum la Napoleona milito.

ŝatataj ideoj ian ajn utilon, servante en ankoraŭ pli alta grado al jam sufiĉe riĉigitaj komercistoj kaj industriistoj?

Jen kial ni devas turni nian atenton al klarigado de la kultura signifo de Esperanto, kiu estas ja ne malpli granda ol la pure teknika (aŭ: mekanika, kiel volas aliaj).

Tamen ankaŭ klarigi ĉi tion ne sufiĉas. La kleruloj de ĉiuj nacioj bone konscias, ke lingvo internacia povas alporti al la homaro gravajn utilojn ankaŭ moralajn. Sed precize ili estas „tiuj, kiuj plej malmulte havas da influo sur la kurso de l' historio“. Ili ja opinias, ke la kultura valoroj atingitaj de la homaro ĝis la nuna tempo estas tro gravaj, ke oni povu ilin riski perdi per facilanima enkonduko de io tutenova, ĝis nun ne elprovita, kio krome promesas ŝanĝi in capite et in membris la tutan ĝisnunan kulturon. La afero klariĝas, se ni rememorigas, ke la reganta hodiaŭ, estas tute „racia“, vidpunkto estas tiu de la celeco de la mondo en direkto de la progresado kaj nobligo de la mondo. Kiu tion kredas, kredas ankaŭ, ke la ĝis nun atingitaj valoroj estas por ni sanktaj kaj netuŝeblaj.

Ni tial ankaŭ per niaj klarigoj, nome ke ni ne celas detrui la nun ekzistantajn valorojn sed ilin evoluigi plue, ne povos sukces. Tro karaj estas al la kleruloj iliaj ideoj; ili tiel facile ne igos sin konvinki.

La sola, kion ni devas fari, estas ankaŭ ĉi tie per faktoj krei la argumentojn. Ni profundigu en ni la volon al kreo de la nova mondo kaj ni seninterrompe konstruu novajn valorojn de ĝenerala tuthomara signifo.

Ke la ĝenerala konferenco pri instruado de Esperanto estu la unua markanta ŝtono sur tiu ĉi vojo!

Kraków. Leo Turno.

Nokto en la Kalabraj Montoj.

Unu tagon mi vojaĝis en Kalabro. Ĝi estas lando de maliculoj, kiuj, mi supozas, amas neniun kaj speciale malamas la Francojn. Diri kial, postulus tro longan tempon; sufiĉas, ke ili nin morte malamegas kaj ke oni tre malbone pasigas sian tempon, kiam oni falas en iliajn manojn. Mi havis kiel kunvojaĝanton tre belvizaĝan junulon. Mi tion diras ne por vin interesi, sed nur, ĉar estas vere. En tiuj montaroj, la vojoj estas krutprofundaj; niaj ĉevaloj marŝis kun multe da peno; mia kolego iris antaŭe; pro iu vojeto, kiu ŝajnis al li pli oportuna aŭ pli mallonga, ni perdis la gustan direkton. Mia estis la kulpo; ĉu mi devus esti fidinta dudekjaran kapon? Mi serĉis ĝis malapero de la taglumo nian vojon tra la arbaroj; sed ju pli ni serĉis, des pli ni devojiĝis, kaj la nokto estis tute malluma, kiam ni atingis domon tre nigran. Ni eniris, ne sen suspekto, sed kion fari? Tie ni trovis tutan familion de karbistoj ĉe tablo, al kiu per la unua vorto oni nin invitis. Mia kunulo senhezite akceptis, kaj baldaŭ ni estis manĝantaj kaj trinkantaj, li almenaŭ, ĉar mi mem ekzamenis la lokon kaj la mienon de niaj gastigantoj. Niaj gastigantoj havis ja mienojn de karbistoj, sed la domo similis al armilejo. Oni vidis nur pafilojn, pistolojn, sabrojn, tranĉilegojn. Ĉio malplaĉis al mi, kaj mi bone vidis, ke ankaŭ mi malplaĉis. Mia kunulo, male, estis kvazaŭ ano de la familio; li ridis, babilis kun ili, kaj per nesingardeco, kiun mi devus esti antaŭvidinta, li unue diris, de kie ni venis, kien ni iros, kiuj ni estas. Francoj! imagu! ĉe niaj ĝismortaj malamikoj, solaj, elvojaĝintaj, tiel malproksimaj de ĉia homa helpo! kaj poste, por

La peza kolĉeno.

De D-ro Joh. Ev. Schweiker.

Oni sidadis en la trinkejo: komercistoj, fabrikantoj, bankistoj, ĉiuj — riĉegaj sinjoroj.

La interparolado koncernis hodiaŭ, same kiel jam ofte, la virinon, precipe la sopron de la virino je kolornamoj.

Komercisto B. rakontis, ke lia edzino ne ĉesis peti lin, ĝis fine li donacis al ŝi brillantan ĉenon por kvindek mil markoj.

Fabrikanto S. sciigis, ke lia karulino Eleonora ricevis de li juvelan ĉenon, kiu pezis pli ol tri cent gramojn.

„Ho, vi fanfaronulo!“ ekris lia tablonajbaro. „Tio estas vera fakto!“ certigis la fabrikanto.

„Nu, koncerne la pezon de kolĉeno“ interdiris bienposedanto H., „ankaŭ mi scias raportoj pri fakto el mia vivo, kiu certe eĉ pli multe mirigos vin, sinjoroj. Mi iam aĉetis al ino, kiun mi tre ŝatis — Lizi estis ŝia nomo — kolĉenon; ĝi pezis ne malpli ol unu kilogramon.“

Bruanta ridado sekvis iliajn vortojn. „Sinjoroj, efektive unu kilogramon!“ ripetis H., „kaj mi estas preta, pruvi tion. Ĉi tiun ĉenon mi ankoraŭ konservadas. Kara Lizi bedaŭrinde jam ne vivas. Se vi deziras, mi alportos la ĉenon.“

„Jes, alportu, alportu ĝin!“ kriis ĉiuj. H. ekstaris kaj iris hejmen. Jam post kelke da minutoj li revenis, portante sub la brako keston. „Jen interne ĝi troviĝas!“ li diris, malfermis la skatolon kaj metis la ĉenon sur la tablon. Tio estis la ŝtala kolĉeno de lia tama plej kara bovino — Lizi! —

Printempa Specimena Foiro de Milano

de la 12-a ĝis 27-a de Aprilo 1922.

La Milana Foiro ne estas ekspozicio, sed internacia vendejo de interŝanĝoj, kiu donas ĉiujare (12—27. aprilo) al komercistoj okazon negoci buŝe kun la ĉefaj produktantoj de artikoloj, kiuj ilin interesas, naciaj kaj eksterlandaj. Do viziti la Milanan Foiro signifas observi tre proksime la lastajn novaĵojn, koni la prezojn kaj la pli bonajn komercaĵojn: tie oni akiras plenan konadon de ĉiuj vendkondiĉoj. Milano pro sia geografia sideo, je la kruciĝo de la ĉefaj vojoj, kiuj unuigas la Orienton kun la Okcidento, la Nordon kun la Sudo, centro disdonanta de produktado, fonto de gravaj komercnegocoj, sidejo de moneraj interŝanĝoj, estas precipe destinata bone influi la malĝojegigan postmilitan problemon kaj servi tuj por la produktanto kaj konsumanto.

La Foiro estas aranĝita tra publikaj promenetoj malfermitaj al la publiko kaj longaj, laŭ la trajto, je 10 kilometroj. Ĝi akceptas vendantojn kaj aĉetantojn el ĉiuj landoj kaj de ĉiuj produktaĵoj.

La foirfakoj, kiujn prizorgas komisiono de lertaj kaj honestaj kompetentuloj, estas jenaj: 1. orafabrikejoj; 2. belartaj industrioj; 3. vestaĵaro, peltoj, trikaĵoj, ombrelloj, bastonoj; 6. ledoj, surĝatoj, vojaĝartikoloj, ŝuoj; 7. sapoj, parfumoj, tualetartikoloj; 8. bazarartikoloj, brosiloj, ludiloj; 9. vitra, fajenca, porcelana industrioj; 10. kemia industrio, farmacio; 11. fotografado, kinematografado, optiko, fiziko, iloj de precizeco; 12. paperaĵ industrioj, grafikarto, aĵoj por oficejoj; 13. teknikaj artikoloj, kaŭĉukaĵoj kaj similaj; 14. elektro-tekniko, lumigado, hejtrado; 15. metalurgio, mekaniko; 16. mebloj ĉiuspecaj, lignoj por kon-

struaĵoj; 17. doma meblaro; 18. muzikarto, muzikaj eldonadoj, muzikiloj; 19. aŭtoveturiloj; 20. bicikloj kaj sport-artikoloj; 21. konstruado hidraŭlika; 22. importaj kaj eksportaj societoj; 23. malgrandaj industrioj, patentoj kaj eltrovaĵoj; 24. kolonioj, ktp.

La vizitanto la Foiro povos uzi jenajn profitojn: a) vojaĝraboĵojn, b) transportraboĵojn, c) pasportraboĵojn, d) servon de interpretistoj (ankaŭ Esperantistoj), e) servon de agentejo prizorganta la loĝejoj, f) servon de banko kaj de monŝanĝo, g) servon de ekspedado, h) servon de publikigejo, i) servon de informoj kaj klarigoj, k) specialajn poŝtajn kaj telegrafajn servojn, kaj fine li povos uzi Oficialan Katalogon, Gazeton kaj Tagjournalon de la Foiro.

Milano, kiu estas vastega laborejo, kiel montras ĝiaj miloj da fumantaj kamentuboj, donas — pli ol ĉiuj aliaj italaj urboj — okazon bone kaj precize kompreni la gravecon de la itala produktado kaj konsumado. Partopreni aŭ viziti la Milanan Foiro signifas havigi al si la duoblan okazon plivastigi la ĉirkaŭon de siaj propraj aferoj kaj ĝojigi la animon per la naturaj belaĵoj, kiuj ĉirkaŭas unu el la plej interesaj kaj grandaj urboj.

La itala popolo, la milana popolo vin vokas frate kaj amike transiri sian landlimojn! Nun, post kiam revenis la paco inter la popoloj, renaskiĝu tiu ĉi belega nobla konkuro de labora superemo, por ke ĝi disdonu materian bonstaton kaj intelektan ĝojon inter la homaro!

Ippolito Piatti,
sekretario de „Esperanta Domo“,
del. de UEA por Milano.

XI-a Germana Esperanto-Kongreso

en Breslaŭ (3.—6. junio 1922.)

Sesa komunikilo.

1. Ĝis nun fakkunstoĉojn anoncis: akademianoj, ekzamenantaro, fervojoficistoj, instruistoj, tunuloj, katolikoj, komercistoj, poŝtoficistoj, UEA.

2. Gesamideanoj ne venontaj al Breslaŭ estas petataj, ankaŭ aliĝi. Ili tiel subtenos la kongreson kaj ricevos la kongresinsignon kaj la aliajn kongresmemorarojn.

3. La veturbiletaj kongresekursaj nun kostas: al Zoben (tien kaj reen) pers. vag. III-a kl. 36 mk., IV-a kl. 24 mk.; al Freiburg (Fürstenstein) (tien kaj reen) rapidvag. III-a kl. 72 mk., pers. vag. III-a kl. 56 mk., IV-a kl. 40 mk.; al Riesengebirge (nur tien) rapidvag. III-a kl. 89 mk., pers. vag. III-a kl. 72 mk., IV-a kl. 49 mk. La partoprenantoj, ankaŭ la jam anoncintaj sin, estas petataj, anonci la klason elektotan.

4. La skriba ekzameno komenciĝos vendrede (2. 6.) je 3 h. posttagm., la buŝa ekzameno sabato je 9 h. antaŭtagm. La ekzamenoj bonvolu baldaŭ anonci sin al la Saksia Esp. Inst. en Leipzig. (Vidu GE 1920, n-o 7, paĝ. 86.)

5. La Esperantista Kantaro kun akompanaĵo per piano, aranĝita de Paul Benemann, reaperos antaŭ la kongreso, kaj ĝi estos havebla en librovendejo de la kongresejo.

6. Kongresajn sigelmorkojn bonvolu mendi ĉe s-o Habellok, Breslaŭ X, Schleiermacherstr. 19. Po 100 ekzempleroj 8 mk. (afrankitaj).

7. Bonvolu helpi pligrandigi la garantian fondon! La firmo Hirt kaj filo en Leipzig afable donacis por la kongreso 1000 mk. Imitinda ekzemplo! La eldonejo Friedrich Elfersiek afable donacis al la kongreso 100 ekzemplerojn de la kanlibro de Pillath = 800 mk.

Kotizaĵo ĝis 1. 4. 20 mk. (por plua samfamili-anoj 15 mk.) — poste po 10 mk. pli — estas sendota al s-o Habellok, poŝteka konto Breslaŭ I 13987.

Hanuschke, kongressekr.
Breslaŭ IX, Hedwigstr. 11.

Ruĝa Kruco.

En Montevideo (Urugv.)

s-o Enrique Legrand komencis Esp. kurson por 30—40 sinjorinoj kaj fraŭlinoj, kiuj antaŭ nelonge ricevis diplomon de malsanulstinoj.

Lernejo.

La urbo Padova en Italujo

sin pretigas sekvi la ekzemplon de Milano, Cremona kaj aliaj urboj, enkondukante instruadon de Esperanto en superaj elementaj lernejoj. Tiucele oni malfermis kurson por 40 geinstruistoj, gvidatan de s-o A. Allegranzi, instruisto en supera urba lernejo.

Prudenta decido.

Sen komentario ni represas sekvantan leteron, kies legadon ni rekomendas precipe al ĉiuj gazetofondemuloj en Esperantujo:

Mi havas la honoron al vi komuniki, ke nia ilustrita gazeto „De Prinses“ ne aperos pro la tro malmulte da abonantoj. Mi ne kuraĝas preni sur min la eldonon pro tiu motivo. Ankaŭ mi tute akordas kun via artikolo pri la „gazetofonda febro“, kaj mi pli volonte vidas unu gazeton grandegan ol dek suferantaj gazetojn. Al la samideanoj, kiuj sendis monon, mi baldaŭ resendos ilian monon.

Esperante, ke ĉiuj estas kontentaj, mi signas respekteme

J. J. van Wensveen
Warmoesstr. 118
Wormerveer, Nederlando

Mallongaj Esp. Scilgoj.

Vigla movado en Salzburg (Aŭstrio).

Kompletige al nia raporto en antaŭa numero ni publikigas jenon: S-o prof. Christanell instruas la tutan superan gimnazion de „Borromäum“ kaj gvidas kurson en knabina liceo kun 12 lernantinoj. S-o Huber gvidas kurson kun 45 p., alian en la instituto „Kapellhaus“, kie la direktoro kaj 15 lernantoj lernas Esperanton, kaj alian por progresintoj. S-o Gsöttner instruas 40 lernantojn, s-o koncertmajstro Schmid 20 kelnerojn, s-o Vogel ĉ. 60 laboristojn — Pro multaj deziroj oni ŝanĝis la daton de la Sudgermana Esp. Kongreso: ĝi certe okazos je Pasko (16. 18 apr.).

Finnlando.

Nova grupo en Kotka, kursoj en Ilmajoki, Kauhava, Kurikka, Laihia, Lauttakylä, Porl, Turku kaj Vähäkryö.

Italio.

Novaj grupoj en Barile (Potenca) kaj Brindisi.

Franclanda kroniko.

Nova grupo en Villejuif apud Paris, dank' al la ago de ŝtata inĝeniero s-o Cozic.

En Paris, dank' al klopodoj de s-o Decourt, licea prof., fondiĝis Esp. grupo de fraŭlinoj „Juneco“ (prez. fino Suzanne Becuwe, 127, bd. Voltaire); korespondantiinoj dezirataj.

Kursoj en Ceret (s-ino Julia, 20 lernantinoj); alia de l' inspektoro de unuagrada lernejo, 15 lernantoj), en Arcueil-la-Chan apud Paris (ŝtata inĝeniero Basset), Lille (universitata prof. s-o Vanverts ĉe Instituto de Fiziko), La Mure (kolegia prof. Caillet por fraŭlinoj, tri lecionoj), Nice (kurso post parolado de s-ino Tiard), Soissons (du kursoj de s-o Thomas en la supera unuagrada lernejo, kun permeso de la lernejestro).

Germanlando.

La laborkuns'oj de Esperanto-Gruparo Berlin okazas nun regule ĉiun trian mardon de l' monato je 6 h., antaŭ la konversacia vespero, en la hejmo Bellevuestr. 15; la estrar-kunsidoj ĉiun unuan mardon je 5.30 h. Ĝis nun 12 grupoj aliĝis al la gruparo. Kursoj komenciĝis ĉe la grupoj Neukölln (la magistrato de Neukölln promesis sumon de 5000 gmk. por la propagando), „Merkur“ kaj Friedrichshagen (ĉe la popola allernejo). Fondiĝis Akademia Esp. Grupo: proksima kunveno la 31. marto en kafejo Wieser, Berlin, Lützowstr. 92. La 13. marto okazis parolado de s-o W. Markuse en la Studenta Esperanto Unuĝo Berlin.

En Traunstein (Oberbayern) okazis la 4. marto Esp. varbotago kun modele aranĝita libroekspozicio. Ĉar samtempe kunvenis la instruistaro de la tuta distrikto, estis gajnataj novaj anoj el la juna instruistaro. Vespere lumbildparolado de s-o Dörfler el Mühlendorf.

Ĉeĥoslovakio.

En Bardiov (Slovakio) s-o d-ro Austerlitz faris paroladon laŭ peto de la loka ŝtata poliestro insp. Zdvoraček, kiu mem lernas Esperanton kaj ankaŭ per cikuleroloj alvokis multajn societojn de la urbo, por ke ili laŭeble are partoprenu la komencotan kurson.

En Meierhöfen apud Karlsbad okazis la 18. febr. karnavala balo kun devizo: Unu nokto en Esperantujo. La festo bonege sukcesis. El la enspezoj oni donacis 150 Kč. al la lernejo.

En St. Gallen (Svisl.)

s-o Hans Kürsteiner gvidas perfektigan kurson por aspirantoj al supera diplomo. La Esp. Societo St. Gallen nomis s-on K. honora membro de la societo.

R. V.

Ni estis raportintaj, ke GEA sin turnis al UEA kun la invito, fari kun la gazetoj kaj la L. K. la necesajn intertraktojn por sistema internacia vortaro („R. V.“, konforme al la propono en ET 43). — Ĉar ĝis la 1. jan. konkretaj rezultatoj ne estis atingitaj, s-o Wüster, al kiu GEA kaj UEA proponis la komision pri la ellaborado de la R. V.-vortaro, reiris sian tiam donitan deklaron pri preteco kaj ĉesigis la intertraktojn kun la eldonejoj.

Esperanto-infanfestoj

okazis la 4. marto en la novfondita urbo Freiberg apud Dresden (Germ.). La festo klare pruvis, ke Esperanto estas efektive facile elernebla lingvo por ĝelernantoj de popollernejoj.

Gazetaro.

El Pais, Montevideo, Urugv., 3. 2. (Esp. kaj Ruĝa Kruco.) El Pellice, Torre Pellice, Italujo, 24. 2. (Longa ĉefartikolo pri Esp.)

La Tribuna dei Ferrovieri, Bologna, 15. 2. (Fervojistoj kaj Esp.)

Il Maglio, Torino, 4. 5. (La helplingvo.) Les Echos, 8. 2. L'Exportateur Français, 13. 2., ambaŭ en Paris, kaj Le Salut Public en Lyon, 10. 2., raportis pri Esp. kaj Franca Kolonia Ligo.

Le Journal, Verviers, 25. 2. (Art. pri Belga Esp. Ligo.) La Dernière Heure, Bruxelles, 27. 2. (Esp. anonco.) B. Z. am Mittag, Berlin, 7. 3. (Art. pri la Esp. Instituto por la Germana Respubliko.)

Frankfurter Messzeitung, 4. 3. (Art. pri la centjarfesto de l' brazila sendependeco, laŭ Esp. prospekto.) Messezeitung Reichenberg, Ĉeĥosl., febr. (Art. germanlingva: Ĉu vi ankaŭ jam uzas Esperanton?)

Reichenberger Zeitung, Reichenberg, Ĉeĥosl., 25. 2. kaj 9. 3. (Artikoloj pri Esp.) Nya Folkeets Röst, Stockholm, 4. 3. (Esp. kurso kaj rakonio tradukita per Esp. el rusa lingvo.)

Prospekto

de la firmo Ferd. Hirt & Sohn en Leipzig estas aldonita al la tuta eldonnumero de la hodiaŭa numero de ET. Ni rekomendas ĝin al la bonvola atento de nia legantaro.

Parolejo.

114. La sveda karavano al Praha. (Rilatas al 108, 111 kaj 112.)

Respondo al s-o Henning Hildor.

Tre estimata samideano,

Mi turoke gratulas vin pro la bona rezultato de via propagando; mi denove gratulos vin, se post unu jaro la plej granda parto de viaj varbotaj estos ankoraŭ fidela! Sed via metodo restas malaprobinda, eĉ se ĝi havas la duoblan rezultaton! Kial do mi estas informiginta pri ĝia efiko, ĉar mi nur deziris protesti kontraŭ la sistemo? Ĉu ne estas aprobinda, vi demandas, la ideo, unue montri al la homoj, kio estas Esperanto? Tre aprobinda estas tio, sed vi devas fari tion laŭ alia maniero, se vi riskas fari el niaj kongresoj ridindaĵojn. Vi estas prava, ni ne bezonas timi la kalumniojn de la idolistoj, sed en la de mi citita kazo ili ne kalumniis, sed estis tute pravaj, kaj ni devas eviti, ke ili povas prave moki nin.

Se la kongreskomitatoj akceptis kiel kongresanojn personojn, de kiuj ili scias, ke ili ne ankoraŭ scias Esperanton, ili laŭ mia opinio ne agis en la intereso de nia movado, kaj la Praha'anoj eĉ malatentis artikolon 1-an de la Kongresa Regularo.

Mi ne dubas, ĉu estas tute eble, aranĝi peresperantajn karavanojn sen interligo kun niaj kongresoj, kaj tio ŝajnas al mi multe preferinda. Mi estas certa, ke multaj samideanoj havas pri tiu ĉi afero la saman opinion kiel mi, kaj mi ŝatus, se ili bonvolus montri tion.

(I. R. G. Isbrücker.)

(Rim. de Red.: Opinianta, ke la temo nun estas sufiĉe preparollta, ni deziras fermi la diskuton, se la diskutantoj konsentos. Ni atentigas pri tio, ke la L. K. K. de la XIV-a akceptas kiel kongresanojn nur Esperantistojn; aliaj partoprenantoj estas registrataj kiel hel p kongresanoj.)

Mildigo de mizero per Esperanto.

La Hungara Landa Esperanto Societo sciigas, ke la monon senditan por „Internacia Fondo de Esperantistoj por Malriĉaj Hungaraj Infanoj“ de Farnell, Angl. kr. 800.—

- „Boubou, Franc. 200.—
- „Blaise, Angl. 2941.— kaj 10 ŝil.
- „Johann Jensen, Dan. 10 dan. kr.
- „Blücher, Dan. 10 „ „
- „Grethe Monrad, Dan. 2 „ „

kun danko ricevis kaj transdonis laŭ kvitanco al la Mizermovado de la „Nevidebla Gasto“ en Budapeŝt entute hung. kr. 3941.— kaj 10 ŝilingojn kaj 22 danajn kronojn. Je tiu okazo ĝi kore dankas al la grandanimaj donacantoj kaj petas rememori ĉe festo, amuzo kaj ĉe elspezo por luksoj, ke en Hungario ekzistas kelkaj malnavaĵoj, bone konataj samideanoj, kiuj pro mizero eĉ la kunvenojn ne povas viziti kaj al kiuj la hungaraj samideanoj ne povas helpi.

Elĉerpitaj

estas preskaŭ ĉiuj numeroj de ET el la jaroj 1920 kaj 1921. El la jaro 1922 estas elĉerpitaj n-oj 66 kaj 70. Do ni ne plu povos liveri ilin al petintoj.

Recenzejo.

LIBROJ.

ESPERANTO-FINNA FRAZLIBRETO. Pikku esperanto-suomalainen tulkki. Por finnoj kaj eksterlandanoj interesiĝantaj pri la finna lingvo. verkis H. Salokannel. Vaasa (Finnlando). Preseo de Ilkka. 14 : 9 cm. 16 pg. 0,50 fmk., 0,10 sv. fk., 0,02 dol.

PRI LA INTERNACIA LINGVO. Enketo inter bulgaraj scienculoj, verkistoj kaj artistoj. Kunmetita Iv. H. Krestanoff. 21 pg. 14 : 21 cm. Prezo 5 levoj. Bulgara Esp. Biblioteko. n-o 9-10. En bulgara lingvo.

RAKONTOJ EL LA BIBLIO. Laŭ la traduko de D-ro L. I. Zamenhof. 80 pg. 10 1/2 : 16 1/2 cm. B. E. A. Publications Fund n-o 2. Eldonis Brita Esp. Asocio, London W C 1, 17 Hart Street, 1921. Prezo: Broŝur. 1 ŝ. 4 p. aŭ 7 resp. kup.

Ĉi tiuj rakontoj el la Biblio unufoje estis presitaj en „The British Esperantist“ en 1920/21, kaj laŭ deziro de multaj legantoj de tiu ĉi ĵurnalo ili nun estas prezentataj en formo de libreto. Tute ne estas necese skribi longan artikolon pri ĝia valoro; la nomo Zamenhof ne postulas komenton. La enhavo temas l. a. pri la falo de Jeriĥo, Simŝon kaj la Filistoj, Simŝon kaj Delila, Samuel kaj Saŭl, David kaj Goliat, David kaj Bat-Seba, Abŝalom, Elia ktp. — Estas vera plezuro tralegante la rakontojn konstati la facilan kaj modelan skribmanieron de nia majstro; liaj ofte tiel trafaj tradukoj estas tre instruaj. Jam la unua frazo de la unua rakonto enhavas belecon, ekz. Josno fetis sin vizagaltere. La samideanoj ŝatantaj la verkon de nia majstro ne hezitu havigi al si ĉi tiun bibliajn rakontojn, ĉar la daŭre altigantaj prezoj malbeligos baldaŭ al multaj malbonvalutuloj la aĉeton de liaj verkoj. (G. Ajul.)

HIMNARO ESPERANTA. Kompilita de Montagu C. Butler. Dua eldono reviziita kaj pligrandigita. 145 pg. 9 1/2 : 19 1/2 cm. B. E. A. Publications Fund n-o 1. Eldonis Brita Esp. Asocio, London W C 1, 17 Hart Street, 1921. Prezo: Bindita en fleksebla tolo 1 ŝ. 7 p. aŭ 8 resp. kup.

Kiel jam diras la titolo, ĉi tiu tre plaĉe presita kaj bindita libro en praktika (imitinda) formato enhavas himnojn t. e. krom kelkaj profanoj kantoj nur tiajn de religia karaktero, entute pli ol 200 bonstille traduktajn kantojn. La libro estas uzabela de ĉiu kristano, greka, protestanta aŭ roma; ĉiuj tradukoj laŭeble sekvas la originalon sence, rime kaj ritmo. Eĉ neangloj trovas en siaj naciaj himnaroj konvenan arion por preskaŭ ĉiu himno en la libreto. El la tabelo de l' enhavo ni mencias: La Preĝo de la Sinjoro, Bendiro, Laŭdo kaj Danko, La sankta Triunuo, Jesuo Kristo, la sankta Spirito, la sankta skribo, Ĝenerala himno de l' Kristana vivo, Psalmoj, la Dia regno, Himnoj por ĉantado (kantikoj) ktp. (La vorto ĉanto signifas liurgian himno de l' diservo. Oni plej ofte kantas ĉe la psalmokantado). — Estis granda kaj peniga laboro, kiu samideano Butler faris kompilante la himnaron; sed ĝi sukcesas kaj portas la espreble riĉan rekomendon en si mem. El peno iĝos bano. (G. Ajul.)

GAZETOJ.

Vegetarano. Germ. Adreso: Oscar Billemann, Hamburg-Fuhlsbüttel, Germ., Alsterkühnhaussue 586. Esperanta Finnlando. Febr. Kun ilustr. artikolo „Finnlandaj peizaĵoj“.

Holandaj Esperantistoj. 9 marto. Arguso. Febr. Adreso: M. C. R. driguez, Apartado 2482, Mexico, D. F.

La Semisto. Dec.-febr. L' Esperanto. Febr. Nova Tagiĝo. Febr. La Progreso. Marto. Esperantida. Febr. Bulletin Français-Ido. Jan.-febr.

500 adresojn de JAPANAJ

kolektantoj de poŝtmarkoj, poŝtkartoj ktp., krom aliaj adresoj, enhavos la 4-a eldono de BES-adresaro, kiu aperos en majo 1922. La japanaj kolektantoj, de kiuj estos la adresoj en BES-adresaro, bedaŭrinde ne estas Esperantistoj. Sed tio malebligas nenion por vi, ĉar vi povos gajni ilin al Esperanto laŭ instrukcioj en la adresaro.

Prezo de unu ekzemplero de la adresaro estas 1.50 sviz. fk., kun rajto de senpaga enpresado de adreso de l' aĉetanto (en 4-a aŭ 5-a eldono) kaj tri vortoj post adreso. (Ĉiuj pliaj 10 vortoj kostas 0,50 sviz. fk.) Ĉe mendoj de pli ol 10 adresaroj oni donas 10% rabaton. Nur por Rusio, Ukrainio, Siberio, Polio kaj Aŭstrio oni donas valutan rabaton 50%-an.

Kondiĉoj: Pago kun mendo. Oni akceptas kiel pagon ankaŭ neuzitajn poŝtmarkojn je nominala prezo; sed bankbiletoj estas preferataj. — Lasta tempo por akcepto de enskriboj en la 4-a eldono: 31. marto 1922.

La demando pri la 4-a eldono de BES-adresaro estas granda. Se vi volas havi la 4-an eldonon de BES-adresaro, sendu vian mendon tuj al

KAROLO JELÍNEK,
Nitranská 6
PRAHA-KRAL. VINOHRADY
Ĉeĥoslovakio.

Diru pri tiu ĉi anonco al viaj amikoj (ankaŭ ne-esperantistoj) kaj sendu multajn mendojn, por ke vi ŝparu poŝtfrankon kaj al mi laboron! (Leterojn bonvolu afanki filateliste!)

Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto-Handelsbureau)
Diegaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.
Prokuras komercajn adresojn.
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.
Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.
Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpaperoj.

Prezo ĝis nun ne altiĝis

por la memorlibreto „La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof“.

Presita sur luksa papero. Kun multaj ilustraĵoj.

Prezo por ĉiuj landoj inkluzive afanko 17 germ. mk.

Komercio kun Britlando.

Se vi volas aĉeti ion el Britlando, mi volonte helpos vin. Mi reprezentas grandajn fabrikejojn ĉiuspecajn. I. a.:

Kaŭĉukaj
STAMPILOJ.

Harry Heslop, komerca agento, Orrell House, Fairfield, Bury, Lanc.

Importo. Eksperto.

Pollanda Komerc Agentejo

Adolfo Oberrotman, Varsovio, Krak-Przedm. 10

deziras ligi komercajn rilatojn kun gravaj eksterlandaj firmoj, speciale en teknikaj maŝinoj, manufakturo kaj galanteriaj artikoloj; donas ĉiujn informojn pri la polaj komerclokoj.

Nur pograndaĵoj firmoj bonvolu sendi ofertojn kun specimenoj aŭ katalogo.

Reprezentado. Perado.



Vizitu la

6-an Internacian Foiron de Frankfurto a. M.

2.—8. Aprilo 1922

30 Komercago-grupoj en sole unu tereno!

Prospektoj en 14 lingvoj kaj en Esperanto.

Aŭtuna foiro 8.—14. Oktobro 1922.

Petu detalojn kaj informojn de



Messamt (Esperanto-fako)
Frankfurt a. M.

Pension-Hôtel Réchemont Montreux (Svisl.)

Belega situacio. — Komfortaj ĉambroj. Moderaj prezoj.

Sin rekomendas al turistoj kaj vizitantoj de Montreux.

Hispanaj Samideanoj!

Itala ĵurnalo, redaktoro de gravaj gazetoj „Resto del Carlino“ (Bologna) kaj „Giornale del Mattino“ (Verona), korespondanto por Italio ĉe ĉeĥa ĉef-ĵurnalo „Tribuna“, dezirus verki regulajn korespondadojn pri itala vivo (politiko, arto, scienco, aktualajoj ktp.) por hispana taggazeto. Li povas verki Esperante aŭ senpere hispane. Sendu kaj sendigu proponojn al D-ro Umberto Toschi, Cologna Veneta (Verona, Italio). Afablaj perantoj ricevos du Esp. gvidlibretojn tra italaĵoj, kies aŭtoro li estas.

HUNGARA VINO.

La unuarangajn vinojn de la Tokaj-Hegyalya-provinca Vin-Komerc Akcia Societo, Budapeŝt, seriozaj firmoj povas malmultekoste ricevi. Eksperto al ĉiuj landoj de la mondo. — Botelvinoj. —

Informojn donas

Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt VI, Hajos u. 15.

Ĉu vi volas fumi bonan cigaredon?

„FUMODORO“!

Agrabla! Bonodora! Malinfektiga!

Por farmaciejoj, drogejoj, parfum- kaj tabakvendejoj.

Prezo 25 hung. kronoj.

Fabrikas kaj dissendas: „Espero“, kosmetika kaj kemla entrepreno Budapeŝt VII, Almassy-ter 15.

„Fumodoro“ estas la plej bona aerpurigilo. Ni serĉas revendistojn ĉie.

La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondadoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj. Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

Legu, abonu kaj rekomendu la plej bonan informilon pri novaj ŝtatoj de Eŭropo, monatan gazeton

„Nova Eŭropo“

esperanta tribuno de malgrandaj nacioj kun „Ĉeĥoslovaka gazeto“.

Specimena numero senpage!

Administracio kaj redakcio:

Praha II, Tešnov No 10, Ĉeĥoslovakio.

Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Münchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34. Belgia: Frans Schoofs, 48, Kl. Beersiraat, Antwerpen. Bulgara: Georgi Ar. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia. Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau. Estona: Est. Esp. Unuigo, postkasti 6, Tallinn. Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki. Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Cligny, Paris 9. Hispana: Konrado Doménech, Orono, Rambla Alvarez 12-2. Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI. Japano: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio. Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno). Pola: Adolfo Oberrotman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg. Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj. Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1. U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Lustroj el Kristal-vitro

en ĉiuj stiloj kaj grandoj p. elektra aŭ gasa lumigado, fabrikataj laŭ propraj kaj indikataj skizoj.

Ernst L. Hettichnach.

Freiburg i. Br. Germ., Rheinstr. 60. Eksperto al ĉiuj landoj. Kapablaj reprezentantoj serĉataj.

Anoncetoj.

NASKIĜO. Al gesinjoroj Wendler, Halle, Germ., Harz 45, naskiĝis filo, nomita „Arno“, je 15. Jan.

NASKIĜO. Al ges-oj J. Szapiro, del. UEA, Bialystok, Pol., naskiĝis la 12. febr. filo, nomita „Arturo“.

EDZIĜOPETO. 20-jara fraŭlo (Esperantisto), kun forte konservitaj moralaj kvalitoj, serĉas 16—18-jaran sinceran amikinojn en sia vivo. La materiala havejo ne estas grava. Seriozajn proponojn adresu al: Boris D. Konstantinov, por B. M., Pleven, Bulgario.

ESPERANTA INFANOMO. En junio ni atendas nian unue-naskitajn infanojn. Kiu scias verajn Esp. antaŭnomojn, bonvolu sciigi ilin al subskribinto. La mallongigo devas esti facile elparolebla. Dankos s-o A. A. Suerink, Platvoet 96, Diepenveen, Nederl.

RAVIGA TEATROLUDAJO EL FABELLANDO kun majskaraboj, fungoj, pigmeoj, papilioj. Ludebla tuj ĉie, ĉar SEN VORTOJ! Esperanta manuskripto kun muziknotoj sendata kontraŭ 6 sviz. frankoj. — J. Orzech, Inowroclaw, Pol.

ARTAJ INSIGNOJ. „Agrable surprizita pri ilia ĉarma aspekto, s-o Poncet, vic-ĉefdel. de UEA en Lyon, varme rekomendas la artajn insignojn de f-ino Gérard, 9 rue d'Armaillé, Paris 17.“

POŝTMARKOJN de Polio, Danzigo, Litovio kaj Latvio vendas malmultekoste s-o St. Kewalewski, Welniany Rynek 15, Bydgoszcz, Pollando. Oni skribu poŝtkarton ilustritan!

ŜANĜO DE ADRESO. De la monato februaro mia nova adreso estas: Stefano Pedrazzini, ĉe Missas Pedrazzini and Company, Arispe (Sonora, Mexico). Deziras provnumerojn de Esp. gazetoj kaj katalogojn.

GVIDLIBRETO DE ANTWERPEN. Sendu simplan internacian respond-poŝtkarton al s-o Frans Schoofs, del. UEA, 45, Kleine Beersiraat, Antwerpen (Belgujo), por tuj ricevi belan, ilustritan, 32-paĝan broŝuron pri la urbo Antwerpen, sidejo de nia VII-a Kongreso.

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, eksigis sian mislan laborkampon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso: Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantajn ĝefanojn. Responde li sendos leterojn kaj burmajn kaj hindujajn kartojn.

RAPIDIĜU ALIĜI al nova (4-a) eldono de „Bes-a Adresaro de Esperantistoj el ĉiuj landoj!“ Aliĝa kotizo: 1 sv. fk., 6 kc., 12 gmk. aŭ 6 resp.-kup. — Bohema Esperanto-Servo, Moravany, Bohemujo, Ĉeĥoslovakio.

JAPANA POŜFORNO. Oni deziras aĉeti japanan poŝforon kaj karbo-pasteletojn por ĝia varmigo. Vendistoj, sendu prezaron al la adreso: M. Ribas de Pina, Comandante de Artillerie, Palma de Mallorca, Hispanujo.

LETERVESPERON, por havigi al la kursanoj korespondantojn, arangas Esp. klubo „La Stelo“, la 1-an de aprilo 1922. Sendu tuj leterojn kaj kartojn al f-ino Marta Sandberg, Asgatan 25, Eskilstuna, Svedujo, aŭ al s-o Erik Nilsson, Bergsgat 22, Eskilstuna, Svedujo. Ĉiu nepre havos respondon!

Korespondo kaj Interŝanĝo.

Filatelistoj atentu! S-o Meĥail Milĉev, del. UEA, (apoteke S. Menahemov), Varna, Bulgario, vendas pograndaĵoj kaj malgrandaĵoj bulgarajn markojn. Postulu prezojn! Korespondas Esperante, germane kaj france.

Filatelistoj! Mi liveras poŝtmarkojn de Germanujo, Memel, Saar, Alenstein, Silezio, Danzigo, Bayern. Postulu prezojn! S-o Schultze, Rogzow apud Köslin, Pommern, Germ.

S-o Eŭgeno Valkovskij, Bobruisk, Min. gub., Socialistiĉskaja str. 198, Ruslando, korespondas, interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn, leterojn, papermonojn, por flor-kaj legom-semajoj.

Esperantista Rondo „Konkordo“ en Miedzyrzecz (Pol.) petas ĉiujn Esperantistojn donaci libretojn kaj gazetojn. Koran antaŭdankon! Adresu: Herman Brukarz, del. UEA, Miedzyrzecz, Staromiejska 40.

S-o Jurij Varankin, Mironosickaja 9, N.-Novgorod, Rusl., deziras korespondi kaj interŝanĝi.

La katolika societo petas gekorespondemulojn por siaj ĝelernantoj. Petoj direktitaj al la gvidanto de la kurso, s-o J. J. v. Wensveen, Warmoesstr. 118, Wormerveer, Nederlando.

S-o Charles G. Stuart-Menteth, 31 Upper Bedford Place, London W. C. 1 deziras korespondi precipe kun Ĉeĥoslovakio, Rumanio kaj universitatanoj.

Fraŭlo Enrico Kosta, str. Luevedo 45, Sabadell, provinco de Barcelono, Hisp., deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per poŝtmarkoj, poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Frans A. Quist, Nordingrå, Sved., deziras korespondi kun socialistaj gesamideanoj en ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kaj leteroj pri fondiĝo de socialista internacia Esp. gazeto. Vivu Socialismo kaj Esperantismo! Gekamaradoj!

(Ni atentigas pri ekzisto de „Sennacieca Revuo“ kaj aliaj. — Red.)

Kiu homamiko pruntedonas al laboremaj geedzoj dekmil germ. markojn por pligrandigi fondotan laborejon en reinlanda grandurbo. Bonvolu skribi sub signo „Rejno“ al la administracio de ET.

S-o V. Prinada, str. Tonvizinskaja 10, Vladivostok, Siberio, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o V. Tulubjev, Societo „Majak“, K. U. J. V., Vladivostok, Siberio, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj. Kelkaj svedaj knaboj, 12—14 jaraĵ, partoprenantaj Esp. kurson en supera lernejo, deziras korespondi kun eksterlandaj Esperantistoj por interŝanĝo de poŝtkartoj ilustritaj kaj poŝtmarkoj. Adreso: Esperanto-lernejo, Beskowska skolan, Engelbrektsgratan 9-11, Stockholm, Svedujo.

Mi sendas 100 aŭ 200 islandajn kaj div. aliajn bonajn danajn poŝtmarkojn kontraŭ sama kvanto da poŝtmarkoj de via lando. — Skolto Karl Sörensen, Storegade 14, Grenaa, Danlando.

Johannes Mammen, Grenaa, Danlando, membro de kristana knab-unuigo, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj aliajn aĵojn. (Filo de s-ino Magda M., del. UEA)

S-o Aleksandro Fekets, Budapeŝt VI, Szondy strato 88-II-17, Hungario, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn (bfl.) kaj papermonon kun ĉiuj landoj.

S-o Eug. Darden, Sint Jobsstraat 65, Antwerpen, Belglando deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtmarkoj.

Caŭŝani-Noi (Besarabio, Rumanio), f-inoj Ester Rabinovici kaj Olea Ghilman, instruistinoj, deziras korespondi kun seriozaj Esperantistoj ĉiulandaj, serĉas gekorespondantojn por siaj lernantinoj (leteroj, poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustritaj).

Junulara grupo, havanta sian monatan organon (bulgarlingvan) „Junulara penso“, deziras interrilati kun ĉiuj junuloj, junularaj societoj ktp. Adreso: Grupo „Girdap“, str. Nova Cerkovna 20, Rusĉuko, Bulgarujo.

Fraŭlo Ivan Georgiev, str. Ohrid 45, Sofia, Bulgario, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtkartojn kaj leterojn kun samideanoj tutmonde.

S-o Geo Kvejtman, Lodz, Pjejazd 14, Pol., deziras korespondi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj, interŝanĝas monbiletojn, gazetojn k. a.

S-o M. Dudas, Orŝova (Rumanio), deziras interŝanĝi muziknotojn, fotografajojn (mem faritajn), ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

S-o Eŭgeno Molnar, komerc-akademiano, Cluj (Rumanio), str. Universitatil 10, korespondas per leteroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun Francio, Italio, Argentino.

Karl Herrmann, Germanio, Düsseldorf, Becherstr. 32, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per ilustritaj poŝtkartoj.

Hermann Schmidt, Unteraltendurg 10, Merseburg, Germ., deziras korespondi precipe kun fraŭlinoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), leteroj, interŝanĝas ankaŭ Esp. gazetojn.

Rudolf Bierlumpfel, Merseburg, Germ., Lauchstedterstr. 45, deziras korespondi precipe kun fraŭlinoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj.

S-o Georg Neubert, Freiberg, Sa., Germanujo, Hornstr. 27, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustritaj.

S-o Ivan Bogdanov, Ĉerepovec, Ruslando, Deiskajas strato 107 deziras korespondi kun fremdlanduloj kaj interŝanĝas monajn signifojn.